

La Kalumeto

la bulteno de “Projekto Indiĝenaj Popoloj »
oktobro-decembro 2012

« Projekto Indiĝenaj Popoloj » celas prezenti Esperanton al indiĝenaj popoloj tra la mondo kaj faciligi komunikadon inter indiĝenaj popoloj kaj individuoj per Esperanto. Ĝi celas ankaŭ informi esperantistojn pri la situacioj de indiĝenaj popoloj kaj pri kiel popoloj indiĝenaj kaj ne-indiĝenaj povas interagi. Ni kredas ke indiĝenaj popoloj ofte alfrontas similajn situaciojn, exemple: perdoj de terenoj, mondoperceptoj, kaj tradicioj. Ni plu kredas ke komunikado, per Esperanto aŭ alimaniere, helpas indiĝenojn subteni unu la alian kaj pli bone diskonigi siajn kulturojn. Samtempe, PIP komprenas ke multaj indiĝenaj grupoj sentas profundan bezonon revivigi, gardi, kaj antaŭenigi siajn proprajn lingvojn.

Ban Ki-moon okaze de la Internacia Tago de Indiĝenaj Popoloj

(La 19-an de aŭgusto estis la Internacia Tago de Indiĝenaj Popoloj. Ĝi estis proklamita de la Unuiĝintaj Nacioj en decembro 1994 kaj unuafoje prifestita en 1985.)

“Ekde la adopto antaŭ kvin jaroj de la Deklaracio de Unuiĝintaj Nacioj pri la Rajtoj de Indiĝenaj Popoloj, unuopaj indiĝenoj kaj indiĝenaj grupoj utiligas tradiciajn kaj novajn amaskomunikilojn por paroli pri si kaj aŭdigi sian voĉon.

“La temo de la ĉi-jara Internacia Tago de Indiĝenaj Popoloj estas “Indiĝenaj amaskomunikiloj, potencigado de indiĝenaj voĉoj”. Indiĝenoj uzas ĉiujn eblojn amaskomunikilajn—lokajn radio- kaj televidelsendojn, filmojn, filmraportojn, videojn, la paperan gazeton, Interreton kaj sociajn retgrupojn—por interveni en la ĝeneralan informadon, altiri la atenton de la internacia komunumo al la rompoj de homaj rajtoj kaj krei tutmondan solidarecon. Ili kreas ankaŭ siajn proprajn amaskomunikilojn, kiuj prezentas iliajn valorojn kaj helpas ilin lukti kontraŭ mitoj kaj falsaj ideoj.

“Indiĝenaj voĉoj rakontas pri luktado de jarcentoj kontraŭ maljusteco kaj diskriminacio kaj postulas la rimedojn kaj rajtojn, kiuj permesos al ili konservi siajn kulturojn, lingvojn, kredojn, kaj tradiciojn. Ili proponas aliajn konceptojn de evoluo ol la modeloj kiuj ekskludas la spertojn de indiĝenoj. Ili alvokas pri reciproka respekto kaj kultura interkompreniĝo, kiuj estas nemalhaveblaj por la kreado de socio sen antaŭjuĝoj kaj malriĉeco.

“En tiu ĉi internacia tago, mi promesas la plenan subtenon de la UN-sistemo al kunlaboro kun indiĝenaj popoloj, inkluzive de iliaj amaskomunikiloj, por akceli la kompletan plenumon de la Deklaracio. Kaj mi petas la membro-ŝtatojn kaj la publikajn amaskomunikilojn ebligi al la indiĝenaj popoloj prezenti siajn vidpunktojn kaj paroli pri tio kio gravas por ili kaj tion kion ili deziras

“Ni devas utiligi la amaskomunikilojn—indiĝenajn kaj neindiĝenajn, kaj ĉefe la novajn—por krei pontojn, realigi vere interkulturan mondon, en kiu diverseco estas festata; mondon en kiu la diversaj kulturoj ne nur kunekzistas, sed ankaŭ reciproke

altestimas unu la alian por iliaj kontribuoj kaj potencialoj.”

La mesaĝo de Ĝenerala Sekretario Ban Ki-moon indikas tion, kio nun okazas en kelkaj lokoj, kaj tion, kio eble okazos en multegaj lokoj.

Aparte kuraĝiga estas la mencio de la amaskomunikiloj kiujn indiĝenoj kaj indiĝenaj popoloj starigas kaj uzas. Tiuj povas agi laŭ elektoj kaj celoj kiuj estus malpli taŭgaj por ĝeneralaj amaskomunikiloj, ekzemple, la prezentado de lingvo-lekcioj aŭ informoj por politiko aŭ ekonomio tiel, kiel ĝi aŭ ili rilatas kun tre specifa celgrupo.

Ankaŭ ni ne forgesu ke la amaskomunikiloj produktas plurajn kaj diversajn postenojn kiuj ĉie estas gravaj kaj kiuj ofertas ekonomiajn eblecojn ege bezonatajn de indiĝenoj.

“Pli laŭte, pli klare, pli konvinke...”

Dum mi tralegis la septembran (UK-an) numeron de Esperanto-revuo por 2012, mi trafis la paroladon de Mark Fettes. Ĝi enhavis la jenajn frazojn, denove legindajn rilate je PIP:

“Ni [...] laboras por mondo kiel eble plej multelingva kaj multekultura, kie la diverseco de la homaro kompletigas la biologian kaj ekologian diversecon de ĉi tiu mirinda planedo. Ni ne ĉesu diri tion, ĉiam pli laŭte, pli klare, pli konvinke. Sed se tia estas nia rolo, ĝi kunportas ankaŭ respondecon. Ni ne rajtas facilanimi pri nia lingva supereco; ni devas klerigi nin pri socia multlingveco, kaj komenci vidi Esperanton ne kiel solvon, sed kiel elementon en paca, justa, daŭripova lingvopolitiko por la disvolviĝo de plurlingvaj socioj en ĉiam pli interplektita mondo.”

Kompreneble, esperantistoj de diversaj landoj kaj personecoj havos siajn ununopajn reagojn al tiu deklaro. Mi loĝas en lando (Usono) kie kelkaj lingvoj formortas, kelkaj prosperas, kelkaj reviviĝas, kaj ĉiutage homoj alvenas al la lando kiuj ne denaske parolas la anglan aŭ tute ne parolas ĝin. Pro tio, mi pensas—kiel usonano kaj kiel esperantisto—pri du lingvaj demando kiuj tre gravas al mi:

1. Ke ĉiuj homoj kiuj loĝas en Usono laŭeble lernu la anglan, por ke ili povu eviti mistraktadon kaj por ke ili partoprenu la vivon de la lando.
2. Ke lingva diverseco ade vivu kaj prosperu en tiu lando, kiel nun faras politika kaj religia diverseco.

Mi kredas ke la esperantistoj de la amerikaj landoj havas specialajn kaj vere belajn okazon kaj respondecon pri lingvoj: krei lingvan bazon por landa unueco per la hispana, la angla, la portugala, aŭ la franca, laŭ la lando kaj ĝiaj historiaj realoj, kaj samtempe partopreni la konservadon de la lingvoj indiĝenaj kaj eleksterlandaj kiuj ekzistas en la lando, kaj antaŭenigi Esperanton kiel unikan pontolingvon internacian. Legantoj de ĉiuj landoj, kiuj estas viaj reagoj? Kio okazas en viaj landoj pri multlingveco?

La Internacia Tago de la Gepatra Lingvo.

Je la 21-a de februaro de ĉiu jaro ekde 1999, lingvemuloj kaj aliaj personoj kunfestas la Internacian Tagon de la Gepatra Lingvo.

ITGL povas esti gaja tago, sed tiuj, kiuj scias la historiojn de lingvoj scias ke tiuj historioj povas esti ankaŭ malgajaj. Fakte, ITGL komenciis kiel atentigilo pri la lingva libereco en Orienta Pakistano (nuna Bangladeŝo). La pakistana registaro dekretis en 1948 ke la urdua estu la oficiala lingvo de la tuta lando, paŝo kiu neoficialigis la bengalan; kontraŭa movado bengala naskiĝis. En 1952, universitataj studentoj kiuj subtenis la egalrajtecon de la bengala mortis pro policia pafado.

De tiu malgajega momento venis festotago kiu prezentas al la publiko informojn kaj spertojn pri lingva diverseco, lingvolernado, multelingva edukado, kaj similaj temoj.

Esperantistoj kaj la Esperanto-movado partoprenas la ITGL, sed ĝis nun, PIP ne trovis la propran manieron aŭ manierojn per kiu(j) festi per la ITGL la riĉegecon de la homa lingvo-trezoro. Ĉu ni serĉu nian propran manieron? Per la uzado de la Interreto kaj per la multenacieco, multekultureco, kaj multelingveco de la anaro de PIP, ni certe povos aldoni specialan guston al la festado.

Februaro rapide venas! Ni interkomuniku pri niaj fest-ideoj. Sendu ilin al mi kaj mi plusendos al la tuta PIP-anaro per specialaj bultenetoj por ke ni povu elekti kaj decide kiel festi pri ĝi kaj kiel komuniki pli larĝe tion, kion ni faras kaj faros.

Rio + 20

Jam okazis (la 20-an ĝis la 22-an de julio 2012) la monda konferenco Rio+20 en la antaŭa ĉefurbo de Brazilo. Kiam mi komencis legi la postkonferencan raporton, mi rimarkis du triopojn kiuj meritas nian atenton: La unua estas la integriĝo de tri aspektoj de loka/regiona/monda disvolviĝo:

-- ekonomia

-- socia

--

vivmedia.

La dua estas la plej larĝaj paŝoj per kiuj oni povas atingi disvolviĝon:

-- elradikigo de malriĉeco

-- ŝanĝado de kondutmoroj kiuj malantaŭenigas nedaŭripovajn manierojn de produktado kaj konsumado al tiuj, kiuj antaŭenigas daŭripovajn manierojn de produktado kaj konsumado

-- produktado kaj administrado de de la naturaj rimedoj kiuj subtenas ekonomian kaj socian disvolviĝon.

Kompreneble, unu afero estas listigi deziritan celon aŭ paŝon ("ekonomia disvolviĝo") kaj alia afero estas okazigi ĝin, aŭ eĉ okazigi la cirkonstancojn per kiuj oni povus okazigi ĝin. Eĉ pli malfacile estas imagi la eblajn signifojn de tiuj frazoj al indiĝenaj gentoj kaj gentanoj. Fakte, la koncepto de disvolviĝo devas ŝajni tute stranga al anoj de gento kiu kredas ke ĝi kaj sia kulturo baziĝas en antikvega, neŝanĝenda pasinteco, eĉ en la bazaj realoj de la kreado de la mondo. Kiel tiuj

gentanoj komprenu “disvolviĝo” aŭ “elradikigo de malriĉeco”? Ĉu indiĝeno kiu komprenas tiujn konceptojn fakte estas kultura indiĝeno, aŭ ĉu li aŭ ŝi estas, kiel oni diras en Usono, “weekend Indian” [semajnfina indiano], kiu loĝas en urbo, ne flue aŭ tute ne parolas la lingvon de sia indiĝena popolo, sed “semajnfine” partoprenas la kulturon aŭ kulturrestaĵojn de sia gento kun pli aŭ malpli da sindediĉo? Fakte, oni povas kontrasti (kaj diversaj antropologoj, verkistoj, kaj aliaj jam faris tion) tiujn indiĝenojn kiuj loĝas en tradiciaj lokoj kaj iugrade vivas laŭ tradiciaj moroj kaj manieroj, kaj kiuj trovas la manierojn per kiuj nedetruite rilati kun sia vivmedio, kun tiuj indiĝenoj kiuj loĝas en urbo, laboras, ekzemple, en hospitalo, kaj kredas je monde grava religio (aŭ neniu religio).

Ĉu vere estas necese ke oni estu ĉe unu ekstremaĵo aŭ alia? Eble esti indiĝeno en la hodiaŭa mondo estas afero de mem-kreado, kiel ĉe la situacio de sudamerika tribo kiu kultivas netradiciajn plantojn por perlabori la monon per kiu ĝi defendas kaj vivas sian tradician kulturon. Eble tiu indiĝena grupo povos indiki al pli tradiciaj gentoj kiel postvivi kontakton kun internaciigita mondo kaj samtemple reteni tradiciojn kiuj ordigas kaj riĉigas la vivon.

Ĉu “Rio+20” estas prikomentinda? Se jes, kiuj estas viaj komentoj?

“Indiĝenaj Popoloj kiel Partoprenantoj...”

Jen citaĵo el malneta versio de dokumeto verkita de “Forest Peoples Programme,” [Programo pri Arbarularoj]. La nuna titolo de la dokumento estas “Indiĝenaj Popoloj kiel Partoprenantoj je Decidoj pri la Konvencio pri Biologia Diverseco.”. Laŭ mia scio, la malneta versio ekzistas nur en la angla.

“Tradicia kuratoreco/prizorgeco agnoskas la tutisman ligitecon de la homaro kun ekologiaj sistemoj, kaj devoj kaj respondecoj de indiĝenaj kaj lokaj komunumoj, konservi kaj daŭrigi siajn tradiciajn rolojn kiel tradiciaj kuratoroj kaj prizorgantoj de siaj ekologiaj sistemoj per la konservado de siaj kulturoj, spiritaj kredoj, kaj kutimoj. Pro tio, oni devas agnoski kulturan diversecon, inkluzive lingvan diversecon, kiel ŝlosilojn por la konservado kaj daŭrigebla uzado de biologia diverseco. Tial, indiĝenaj kaj lokaj komunumoj devus, laŭ cirkonstancoj, partopreni la administradon de la terenaro kaj akvaro kiujn ili tradicie okupas aŭ uzas, inkluzive sanktaj situojn kaj ŝirmitajn lokojn. Eblas ke indiĝenaj kaj lokaj komunumoj rigardos kiel sanktaj kelkajn speciojn de plantoj kaj bestoj, kaj, laŭ siaj roloj kiel prizorgantoj de biologia diverseco, ili responsos pri iliaj bonstato kaj daŭripoveco; oni devas respekti tion kaj kalkuli kun ĝi rilate ĉiujn agadojn kaj interagadojn.”

Kontribuo de leganto

S-ro Kimura Goro Christoph de Universitato Sophia, Japanio, helpeme disponebligis al legantoj de La Kalumeto artikolon kiun li verkis pri Esperanto kaj malplimultaj lingvoj. Jen ni aperigas la resumon de la artikolo; la rezumo jam ekzistas en Esperanto. Tiu, kiu deziras legi la tutan artikolon (havebla nur en la angla), bonvole kontaktu s-ron Kimura ĉe goro@sfc.keio.ac. Mi multe dankas al s-ro Kimura pro lia sindonemo kaj helpo.

Esperanto kaj malplimultaj lingvoj: lingvosociologia komparo

Resumo:

“Ŝajnas ke Esperanto kunhavas kelkajn bazajn trajtojn kun malplimultaj lingvoj, tiel ke Esperanto bone arigeblas inter tiuj lingvoj. Aliflanke, inter malplimultaj lingvoj observeblas tendencoj rigardataj tipaj por Esperanto, kiel volunteco, ne-etna konsisto, ne-teritoria distribuo, aŭ interna ideo. Kelkaj fenomenoj kaj tendencoj en Esperanto pli klare videblas en aliaj malplimultaj lingvoj, kaj inverse. Esperanto kaj (aliaj) malplimultaj lingvoj povas roli reciproke kiel spegulo. Ne nur la celoj, sed ankaŭ la aktualaj ŝancoj kaj problemoj de tiuj lingvokomunumoj sufiĉe similas. Do, kunlaboro kaj komparaj studoj estos fruktodonaj.”

El la libro “Pre-Columbian Literature,” redaktis David William Foster...

“Mexican Literature: a History” [Meksika Literaturo: Historio] de Joanna O’Connell

“Jam delonge oni sciis ke imagojn kaj piktogramojn en la skulptaĵoj, frizoj, kaj libroj, oni uzis kiel ŝlosilojn por la laŭtlegado en parola sistemo komunikita per sistema parkerado en lernejoj kaj temploj, precipe en la navatla kulturo de centra Meksiko. Por la antikvaj mezoamerikanoj, la komunikado de la vorto per skribitaj tekstoj akompanis man-en-mane la zorgeman flegadon de paroltradicioj pri historio, rito-realigado, astronomio, profetado, kaj rakontado de la faroj de dioj kaj homoj. Laŭtlegado estis ankaŭ arteca prezentado, recetado zorgeme rilatita al la vidaĵaro de teksto kiu kombinis imagojn kun skribitaj signoj kiuj mem estis integraligo de vorto kaj imago. Skribado kaj pentrado tiel ne estis apartaj esprimiloj en Mezoameriko.

“Navatla kanto donas gracian imagon de la legado-faro:

‘ Mi kantas la bildojn de la libro
kaj vidas kiel ili malvolvas sin;

Mi estas eleganta birdo

ĉar mi paroligas la kodeksojn
en la bildejo.”

El La Ĉeroka Esperantisto de Billy R. Waldron, 30 marto 1988

“Sekvojo kreis la ĉerokan silabaron. Post tio, ĉeroka literaturo komencis flori.

“En 1821, la registaranoj de Ĉerokujo, post elprovado, aprobis kaj akceptis silabaron kreita de Sekvojo. Oni povas legi en libroj ke Sekvojo estis la sola homo en monda historio kiu kreis skribosistemon por sia propra popolo. Oni diras ke la ĉeroka silabaro estis la sola skribosistemo kiu estas la laboro de unu persono. La originala silabaro enhavis neniajn latinajn, grekajn, aŭ cirilajn literojn. Post la triba akcepto, Sekvojo ŝanĝis la originalan silabaron por ke la lingvo estu presita. La presisto ne havis ĉerokajn literojn. Li nur havis latinajn, cirilajn, kaj grekajn. La presisto tamen faris sekvojajn. Do, plejparto de la reviziita silabaro estis latinaĵoj, cirilaĵoj, grekaĵoj, aŭ iaj tordaĵoj de ili. Kelkaj literoj el la originala silabaro tamen troviĝas en la revizita.

“La Ĉeroka Fenikso estis la unua indianlingva gazeto en la mondo. Ĝi aperis en 1828. Ĝi presiĝis en la reviziita silabaro. La reviziita silabaro estas ankoraŭ uzata hodiaŭ far la ĉerokoj. La originala silabaro ne estas uzata. Oni ĉesis uzi ĝin kiam Sekvojo reviziis ĝin. Ĝi tamen estis la komenco de la afero. [...]”

La Trankvilo

Tradicia kanto-teksto de la San-gento de Burkino

Plaĉus al mi resti kun mia patrino.

Mi ripetas ke plaĉus al mi resti kun mia patrino

. Apud mia patrino, estas trankvilo.

Kial mi irus al la domo de viro?

Kial mi irus al la domo de viro?

Li sendormigos min dum la tuta nokto.

Kial mi irus al la domo de viro?

Kial mi iros al la domo de viro?

Li mensogos al mi dum la tuta tago!

Li lasos min kun sia patrino;

la virino estas sorĉisto.

Li lasos min kun sia patro;

la viro estas pompa pavo.

Do, mi restos apud mia patrino.

Plaĉus al mi resti apud ŝi.

Apud mia patrino estas trankvilo!

Tradukis en la francan Andre Nyamba

Tradukis en la anglan Abena P. A. Busia

Women Writing Africa / West Africa and the Sahel

Redaktis Esi Sutherland-Addy kaj Aminata Diaŭ

Amaĵoj—reagoj al la parolado de indiĝena lingvo:

Nish welel—Mia lingvo

(El artikolo kiu aperis en Neŭs from Native California (vintro 2008/9). Verkintino: Louise J. Miranda Ramirez)

“Nish welel’ kurigas mian koron dum ĝi kantas. Kiam mi parolas, mia menso

pensas pri la indianlingva vorto, la fonetika literumado.

[....]

“La vortoj vivas. Oni pensis ke ni formortos; sed jen ni, pretaj por ke nish welel kuru en niaj vejnoj. Ĝi atendis sian pretendiĝon. ‘Mi tutvive pretendas nish welel-on por ĉiuj prauloj, ‘las eŭsha’.

[....]

“Mi sentas la potencon de ‘las eŭsha’ en mia koro kaj kapo.

“Mi ne povas halti mian rideton kiam mi parolas miajn novajn vortojn, la vortoj kiuj permesus ke mi parolu kun mia prapraavino, ‘las lapa,’ Maria Inez Agnes Garcia Miranda. “‘Nish Atsia,’ mia patrino, diris ke ‘las lapa’ ĉiam parolis nian lingvon kun siaj filinoj.

[....]

“‘Las Otno Ayam,’ Kreinto en la Ĉielo, permesu ke nish welel dancu en mia korpo, plenigu mian cerbon je kono, viskozigu mian sangon je kulturo, malheligu mian haŭton je fiero, bruligu miajn okulojn kiam mi kundividas kun aliaj homoj, kaj haltu la sulkojn kiuj okazas pro neelpolebla rideto.

“Mi ne plu silentos. Mi ne diros, ‘Mi estas meksika’ por ke mi ne diru ‘Mi estas indiana’; tiuj infantoj jam forpasis. Nish welel, mia lingvo, mia kulturo, ne plu estas mia sopiro; ĝi estos amaĵo en mia vivo”

Voki kaj kanti

(El artikolo kiu aperis en Neŭs from Native California (aŭtuno 2012). Verkintino: Tima Lotah Link .)

“Dum la antaŭaj jaroj okazis revekiĝo de nia indiana lingvo en la ĉumaŝa (indian-genta) regiono. Oni denove kantas, parolas, kaj preĝas per niaj ĉumaŝaj lingvoj. [...] ili denove priskribas nian mondon. Mi estas tre dankema ĉar mi povas uzi nian lingvon por voki miajn korbofarajn plantojn kaj kanti al tiuj plantoj; tial, en la primara zono de mia granda korbo, mi teksis preĝon en ŝmuid [dialekto], lingvo de nia ĉumaŝa gento: Kiyono hi'l alapay Ĉiel-avo,

kaqina hi'l alishaw mi dankas vin pro la suno;

kaqina hi'l aŭay mi dankas vin pro la luno;

taniqilik hi hol kuhk'u. mi petas ke vi prizorgu nin.

Fiero altestimi amaĵoj.....paroligi.....maljusteco egalrajteco.....produktado konsumado.....interplektitaj kunlaboro.....pompa.

Ĉu la supra vortogrupo estas iu stranga poemo? Ne, do vi ne devas bedaŭri ke vi ne kapablas kompreni ĝin. Kio, do, ĝi estas? Ĝi estas aro de vortoj kiuj aperas en la artikoloj kaj kantotekstoj kiuj troviĝas en ĉi tiu bulteno. Interesa grupo, ĉu ne? Indas rimarki ke la vortoj montras la vivecon kaj riĉecon de indiĝenaj kulturoj kaj

atingoj...viveco kaj riĉeco kiuj povas inspiri nin kiel esperantistojn, kiel
altestimantojn de diversaj kulturoj, scioj, konoj, travivaĵaroj, vidpunktoj, espero.

La Kalumeto, organo kvaronjara de Projekto Indiĝenaj Popoloj

Redaktoro: Erik Felker ejfelker@dslextrême.com